# *Por mi estas honoro ke la usonanoj ataku min, asertas la papo Francisko.*



Romo, 6 sep (RHK) Dum la kutima renkonti?o de la papo Francisko kun la gazetaro kiu akompanas lin en la aviadilo voja?cele, la franco Nicolás Senéze transdonis al li sian novan libron, kie li priparolas la opozicion al la papo inter la plej konservativaj sektoroj de la eklezio en Usono: “Por mi estas honoro ke la usonanoj ataku min”, respondis la papo.

Li aldonis ke “tiu ?i libro estas bombo” ricevinte la libron kies titolo estas “Kiel Usono volas ?an?i la papon”. La supera gvidanto de la katolika eklezio rekonis ke ankora? ne legis ?in kaj nur scias kelkajn detalojn surbaze de publikigita artikolo en italaj gazetoj, raportis Russia Today.

La heroldo de la papo, Matteo Bruni klarigis ke “en neformala kunteksto la papo volis diri ke ?iam li konsideras la kritikojn kiel honoro, speciale kiam venas de rajtigitaj pensuloj, kaj ?i kaze,  de grava nacio”.

La libro de Senéze priskribas la opozicion kiu alfrontas Francisco en Usono, speciale post la publikigo de la apostola alvoko Evangeli Gaudium (La ?ojo de la Evangelio), en kiu li kritikas la ekonomian sistemon kaj la liberan merkaton.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/201205-por-mi-estas-honoro-ke-la-usonanoj-ataku-min-asertas-la-papo-francisko

**Radio Habana Cuba**